La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-28 n-ro 399

# La plej granda vulkano de Islando pretiĝas erupcii denove



Ĉinio: 10 000 mortintoj en Tien An Men en 1989, laŭ malsekretigita telegramo

Germana viro kuris al Ĉinio laŭ la Silka Vojo, eluzante 40 parojn da ŝuoj

Preskaŭ duonkilometra, vitra ponto estis malfermita en Ĉinlando

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Ĉinio: 10 000 mortintoj en *Tien An Men* en 1989, laŭ malsekretigita telegramo
*Ribela movado de ĉinaj studentoj, intelektuloj kaj laboristoj p. 03*

Germana viro kuris al Ĉinio laŭ la Silka Vojo, eluzante 40 parojn da ŝuoj
*Kultura maratono p. 04*

La plej granda vulkano de Islando pretiĝas erupcii denove
*Bárðarbunga p. 05*

Preskaŭ duonkilometra, vitra ponto estis malfermita en Ĉinlando
*488 metrojn longa kaj 218 metrojn alta p. 06*

Hodiaŭe
*Pío Baroja p. 06*




# Ĉinio: 10 000 mortintoj en *Tien An Men* en 1989, laŭ malsekretigita telegramo

La 4-an de junio 1989, la ĉinaj aŭtoritatoj subpremis ĝis sango ribelan movadon de ĉinaj studentoj, intelektuloj kaj laboristoj.

Tiuj ĉi kolektiĝis sur la placo *Tian An Men* [ 天安門 Tiān'ānmén], por postuli de Pekino politikajn kaj demokratiajn reformojn. Laŭ la ĉi-epoka taksado, la masakro estigis plurajn centojn ĝis mil mortintoj. Sed laŭ brita arkivo, kiu ĵus estis malsekretigita, tiu nombro ŝajne estas ege subtaksita: la persekutode la manifestacio ŝajne okazigis dek mil mortinojn.

Sekretigita dum pli ol 28 jaroj, dokumento dediĉita al la eventoj de la placo *Tian An Men* estis ĵus publikigita de la britaj Naciaj arkivoj.

Temas pri sekreta telegramo, sendita la 5-an de julio 1989 matene, tagon post la masakro de *Tian An Men*, subskribita de la brita ambasadoro, Alan DONALD, kiu rakontas pri la perforton, kiu okazis dum la nokto.

«La blenditaj armveturiloj pafis al la homamaso, antaŭ ol ruliĝi sur ĝin»,li skribis. «Ili multfoje ruliĝis sur la korpoj, antaŭ ol la kadavroj estu kolektitaj per buldozoj». La diplomato finas sian raporton per mallonga frazo: «minimuma taksado de civilaj mortintoj: 10 000».

Tio estas multe pli ol la tiamaj akceptitaj taksadoj. Ili variis inter 200 mortintoj laŭ la aŭtoritatoj de Pekino, kaj kelkaj miloj, laŭ la okcidentaj registaroj.

Neniuj ĉinaj amasinformiloj mencias la publikigon de tiu dokumento. En Ĉinio, estas malpermesite elvoki la masakron de *Tien An Men*. Ĉia memorevento estas subpremata, kaj tiu mortiga nokto neniam estis kritikata de la ĉinaj estroj.

Neniam Milito Inter Ni

# Germana viro kuris al Ĉinio laŭ la Silka Vojo, eluzante 40 parojn da ŝuoj

Laŭ germana amaskomunikilo, bankokomizo el la urbo Hamburgo de Germanio, kiu edziĝis al ŝanhaja virino, kuris laŭlonge de la Silka Vojo por naŭ monatoj. Li pensas ke lia vojaĝo nomita kiel "kultura maratono" povas helpi malaperigi antaŭjuĝojn inter malsamaj nacioj. Post travivi multajn malfacilaĵojn kiel frakturojn de ambaŭ piedoj, en la 16-a de decembro, li finfine atingis sian cellokon, Ŝanhajo.




"Mi kuris almenaŭ 11,249 kilometrojn", fiere diris Kai MARKUS, kiam li estis intervjuata de la retejo de la germana amaskomunikilo *Deutsche Welle* en la 20-a de decembro.

Dum la vojaĝo li trapasis la ekstreman malvarmegon en Rusio kaj la ekstreman varmegon de dezerto. Li entute eluzis pli ol 40 parojn da ŝuoj. Malbonŝance, septembre, en la provinco *Hubei*, meza Ĉinio, nur iomete pli ol 1 000 kilometrojn for de Ŝanhajo, li frakturis ĉe ambaŭ kalkanoj kaj ricevis operacion. La fina parto de la vojaĝo estis plenumita sur rulseĝo kaj per trajno. "Mia amiko Victor NEUBAUER, kiu akompanis min dum la tuta vojaĝo, daŭrigis mian vojaĝon. Kiel teamo ni kune finis ĝin."

Antaŭe kiam li estis intervjuita de AFP (*Agence France-Presse*), li informis, ke lia amiko Victor NEUBAUER estis veturanta per malgranda aŭto por akompani lin kaj la ĉareto, trenita de la malgranda aŭto, estis ŝarĝita per nutraĵoj kaj protein-pulvoro. Sed la aŭto paneis en la sama tago kiam liaj kruroj rompiĝis.

Dum la vojaĝo, MARKUS kuris ĉirkaŭ 40-80 kilmetrojn ĉiutage kaj havis ripoztagojn. En ripoztagoj li partoprenis en kulturaj interŝanĝoj.

Li diris ke per kurado, li helpas homojn forigi antaŭjuĝojn pri Ĉinio kaj Germanio. "Ekzemple, germanoj pensas ke ĉinaj produktoj estas malaltkostaj kaj malbonkvalitaj, sed ĉi-foje mi konsumis multajn ŝuojn liveritajn de ĉinaj kompanioj kaj ili ne estas malpli bonaj ol tiuj germanaj."

Li ankaŭ diris al *Deutsche Welle* ke la vojaĝo lin helpis forigi siajn antaŭjuĝojn pri aliaj landoj. "Ĉiuj havas siajn antaŭjuĝojn kaj antaŭe mi pensis ke vojaĝi en Rusio estas danĝera. Fakte kiam mi kontaktiĝis kun rusoj, mi malkovris ke ili estas tre helpemaj."

Li diris al AFP pri malavareco kaj varmeco de nekonatoj. Ekzemple, belorusaj geedzoj cedis sian liton al MARKUS kaj dormis en sofo. Krome multaj fremduloj provizis lin per loĝloko kaj manĝaĵoj, kaj ili kune diskutis pri Dio kaj la mondo.

Laŭ liaj lastaj fotoj, li havas pli da blankaj haroj ol en marto. Sed li kiel patro de 1,5-jara filo ne bedaŭris pri la vojaĝo. Li diris ke la "kultura maratono" alproksimigas popolanojn. Li konkludis ke multaj projektoj povas kunligi popolojn anstataŭ apartigi ilin.

GAO Shuyuan
El Popola Ĉinio

# La plej granda vulkano de Islando pretiĝas erupcii denove

Tertremo vibrosonadoj sub la glaĉero *Vatnajökull* [ˈvaʰtnaˌjœːkʏtl̥] en Islando povus signifi minacan erupcion per la plej granda vulkano de la lando.



*Bárðarbunga* [ˈpaurðarpuŋka], kiu stariĝas 2 009 metrojn super marnivelo, estas unu el la vulkanoj kiujn geologistoj prizorgas post la fluego de lastatempa tertrema aktivado – kio indikas ke la premo en vulkano estas pligrandiganta.

Vulkana fakulo Páll Einarsson ĉe la Universitato de Islando diris al *Daily Star*: “La kaŭzo de la tertremoj de tiu ĉi loko estas ke la vulkano *Bárðarbunga* estas ŝveliganta, kio signifas ke la premo de la magma kameno estas pligrandiĝanta.”

“La vulkano evidente pretiĝas por sia venonta erupcio, kiu eble okazos en la venontaj jaroj. La tertremoj de la lasta semajno nur estas simptomoj de tiu procezo, ili ne kaŭzas la vulkanon erupcii.”

Li diris ke *Bárðarbunga* ekkomencis vibrosoni ekde februaro 2015 – kiam la lasta erupcio de la vulkano kiu ekkomenciĝis en aŭgusto 2014, finiĝis. Antaŭ tiu okazaĵo, la vulkano kaŭzis tertremojn kun pligrandiĝanta frekvenco ekde 2007 – kaj amaso de 1 600 erupcioj dum 24 horoj okazis antaŭ la erupcio mem.

La *Bárðarbunga*-a erupcio de 2014-2015 havis relative malgrandajn konsekvencojn kompare kun la antaŭa, pli malgranda, erupcio de *Eyjafjallajökull* [ˈeɪjaˌfjatlaˌjœːkʏtl̥] en 2010 . Mezgranda erupcio de *Eyjafjallajökull*, kiu estas subglacia stratovulkano, kaŭzis neordinarajn kaj misproporciajn ruinigajn postsekvojn.

La varmeco de la vulkano degeligis la glaciaron, kio kaŭzis inundon. tiam la vulkano elĵetis cindrojn kelke da kilometroj en la atmosfero, kiuj estis portataj milojn da kilometroj super Eŭropo per la supera ĵetfluo.

La cindro estis tiom ege dika kaj malproksima ke ĝi interrompis aviadilajn vojaĝojn por kelkaj semajnoj post la erupcio.

*Bárðarbunga* ankaŭ estas stratovulkano, kaj kvankam la ripeto de *Eyjafjallajökull*-erupcio eblas, tio estas neverŝajna – kiel estis demonstrite per la erupcio de la vulkano en 2014-2015 .

Simon Day Katastrofo-fakulo el *University College of London* [Universitata Kolegio de Londono] diris al *Star Daily*: *“Bárðarbunga*, se ni konsideras statistikon, neverŝajne tion faros.”

Ankaŭ ekzistas pli da vibrosonoj en Islando – pli frue ĉi-jare, Einarsson diris al Islanda monitoro ke kvar vulkanoj estas sur la vojo de erupcio iam en la venontaj jaroj.

La aliaj vulkanoj estas *Grímsvötn* [ˈkrimsvœʰtn̥] , *Hekla* [ˈhɛʰkla] kaj *Katla* [ˈkʰahtla] – inter kiuj la lasta estas konsiderata la plej danĝera vulkano en Islando.

Sed la mondo jam atendas erupcion de *Katla* por kelkaj jardekoj.

La Islanda Meteologia Oficejo ankoraŭ ne maltrankviliĝas. Ĉiuj kvar vulkanoj, fakte, la plejparto de Islandaj vulkanoj, estas verde

markitaj sub la aviada kolorkoda mapo. Tio signifas ke la vulkanoj estas "en normala, ne-erupcia stato."

Fonto (Angla): sciencealert.com

scienco.ir

# Preskaŭ duonkilometra, vitra ponto estis malfermita en Ĉinlando

La ŝtata ĉina televidkanalo CCTV informis pri la ekfunkciigo – la 24-an de decembro en la provinco Hebejo [ 河北 Hébĕi ] – de la tutmonda plej granda vitroponto, kiu estas 488 metrojn longa kaj 218 metrojn alta.




La ponto estis konstruita de la firmao "*Bailu Group*", kaj en la malferma ceremonio ĉeestis ĉirkaŭ 3 mil turistoj, kiuj tiam povis sperti kvazaŭ kapturnan sentumon je piedirado sur travidebla planko inter du krutegaĵoj en la Parko *Hongya*.

La planko de la ponto konsistas el 1 077 vitraj tabuloj kun dikeco da nur kvar centimetroj, kiuj pendiĝas per stukturo fortigita per 12 ŝtalŝnuroj, kun rezista kapablo al tertremoj 6-Riĥtergradaj kaj uraganoj 12-gradaj laŭ la skalo Beaufort.

"Nia ponto estis projektita por elteni pli ol 3 mil homojn, sed por garantio de la sekureco de ĉiuj ni permesos nur 600 turistojn foje", tion diris YANG Shaobo, kiu estas direktisto de la respondeca firmao.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



## **Pío BAROJA**

**Pío BAROJA Y NESSI (naskiĝis en *San Sebastián* je la 28-a de decembro 1872, mortis en Madrido je la 30-a de oktobro 1956), estis grava hispana verkisto.**

**En Esperanto aperis: *La arbo de la sciado; Suzana kaj la ĉasistoj de muŝoj.***

**Vikipedio**